



tintilo

ORGANO DE LA
BRUGA JUNULARO



n°1

FEBRUARO
1969

esperantista amikeco

ORGANO DE "C.J.E.V."

CLUB DES JEUNES ESPERANTISTES VERVIETOIS

TRIMONATA REVUO

TRIMONATIS REVUO

TRIMONATIS REVUO

Karaj Gesamideanoj,

"Tintilo" kaj "Esperantista Amikeco"

anstataŭas ek de nun la 2 revuetojn "Tintilo"
kaj "Esperantista Amikeco" (Brugge kaj Verviers).

Post interkonsento inter la du grupoj
evidendiĝis ke kunfandiĝo de la du apartaj revuetoj
estos profito, ne nur por la du grupoj, sed ĉefe
por la esperantistaro mem: ni esperas ke geju-
nuloj el aliaj urboj starigos grupojn kiuj, kiel
ni, partoprenos al la eldonado de nia revueto.

Respondeculoj por la revuo:

BRUGGE : S-ro Johan MAERTENS
Prins Leopoldstraat, 51
Sint-Kruis

VERVIERS : S-ro Henri VANDERMAECEN
rue Haute 16
Andrimont - Dison

Ni petas la kunlaborantojn, sendi siajn
artikolojn plej rapide, sen atendi la lastan
semajnon. Tio ege faciligos nian taskon.

Proksima Numero : je la 20a de Aprilo.

GRAVAJ SCIIGOJ

I. En Bulgario la ministro pri komunikado
enkondukis kursojn de Esperanto en la specia-
lajn lernejojn pri fervojo poŝto kaj telegrafo.

II. En LIEGE (Belgio) oni enkondukis kroman
fakon pri esperanto en la oficialan "Ecole
Supérieure de Pédagogie" (supera pedagogia ler-
nejo).

Instruas : *Pol-DENOËL*, Kuracisto -
Fredy PALATRE, Licenciato pri PEDAGOGIO
Georges VANBARENSE - emerita profesoro -

III. En MONTIGNET (Liège) Sino LANGONKE
instruas esperanton en "Athénée Royal" (alt-
mezgrada lernejo) - Ili partoprenos el "Grajnoj
en Vento" - 12 geknaboj sekvas la kursojn.

IV. La 18an (aŭ 19an) de Aprilo "Le Club des
Jeunes Espérantistes Verviétois" organizos sian
grandan feston kiel kutime.

V. En Aŭstrio, la registaro enkondukis
kursojn de esperanto en la mezgradajn lernejojn
(2 horoj posmajne en la 3a kaj 4a klaso).

VII: Kiel pasintjare, en nia lernejo, oka-
zas esper. kursoj; instruas S-ro J. Jacob.
Tiujn kursojn li instruas dum la "Activités compl-
émentaires. Nia prezidanto, R. Noël, instruas
esperanton, ĉiu merkredo vespere: estas bona maniero
por mem lerni nian internan lingvon!

Ferioj en Sint-Kruis (Brugge)

Dum la vintraj ferioj la membroj de la junulargrupo de Sint-Kruis plurfoje kunvenis. Ili faris piedan ekskurson de Sint-Kruis al Damme. Estis organizitaj dancevespero kaj kvizo. En ĉiuj arangoj partoprenis dudeko da gejunuloj.

Krome okazis novaj estrarelektoj :

- Prezidento : Paul Blondeel
- Sekretario : Dirk Maertens
- Kasistino : Hilda Lauwers
- Komitatano 1 : Linda Goetahls
- Komitatano : Johan Maertens

Kun la sekventa teksto, ni volas komenci seriojn "pro kaj kontraŭ". La tekstoj estas fari- taj per la membroj de la junulargrupo kaj tiel, ni esperas lerni kelkajn vortojn kaj uzi belajn frazojn.

La valoro de la klasika tradicio.

Kiel Eŭropo dankas sian politikan origi- non al la romana imperio, tiel ĝi dankas sian intelektan kulturon al la klasika tradicio. Ne estas facila por ni konscii la grandecon de tiu heredo ĉar la klasika tradicio tiel influis nian okcidentan kulturon ke ni ne plu sufiĉe sentas sian influon sur nia spirito.

Tra la tuta Eŭropo historio, tiu tradicio estis la fundamento de la okcidentaj literaturoj kaj okcidenta penso. Tiu tradicio pastvivis la person de Romo kaj dum la renesanca periodo, ĝi fortiĝis kaj fariĝis la bazo de la profana eduko kaj la inspiro de la literaturo.

La mondhistorio trovas nur en la Konfucius tradicio de Ĉinio saman ekzemplon. Tamen, la klasika tradicio de Eŭropo diferencas de la Ĉinia tradicio : ĝi ne havas originon enlandan. Romo estis la poranto kiu portis tiun tradicion el la mondo Greka al la okcidenta mondo. En fakte, la klasika tradicio ne estas alia ol la Helenismo.

La plej granda servo de kiun Romo donis al la civilizacio estis certe la maniero sur kiu ĝi adaptis la klasikan tradicion de la Helenismo al la spirito okcidenta. Sekve, la latina lingvo ne sole fariĝis bonega esprimo de la penso, sed ankaŭ "La arĥeo kiu servis la semon de la Helenismo kulturo el la diluvo de la barbarismo" (kiel diris Christopher Dawson en sia "Kreigo de Eŭropo").

(Daŭrigota) Paul BLONDEEL

La variantaj steloj.

Se vi havas bonajn okulojn vi povos rimarkiki ke la brilo de kelkaj steloj ŝanĝas. Atentu! Vi ne konfuzu tion kun la trembrilado kiun kaŭzas nia atmosfero. La ŝanĝo kiun ni konsideras ĉi-tie estas variado dum pluraj tagoj, monatoj aŭ eĉ jaroj. Por rimarki ĝin necesas observado dum kelkaj noktoj. Mallonge: la stelo ŝajnas pli brila dum iuj noktoj ol dum aliaj.

En du tipoj de steloj tio povas okazi:

- unue en la "eklipsaj duoblaĵ steloj". Ĉi-tiuj estas komponitaj de du steloj kiuj turnas unu ĉirkaŭ la alia; kaj tiel ke ni vidas eklipson kiam stelo estas inter ni kaj la alia stelo. Ĉi-tie la variado estas tre regula (perioda).
- due en eksplodantaj steloj. Des pli forta estas la eksplodado, des pli granda estas la variado. La stelo ne detruigĝas per ĝia eksplodado, sed forigas parton el ĝia enhavo. Ĉi-tie la varioj ne ĉiam estas regulas kaj antaŭkalkuleblaj.

La stelaj spektroj.

Kiam la suna lumo falas sur prismon, ĝi dispersas en la diversaj koloroj de la ĉielarko: de la ruĝo ĝis la indigo. Tiuj koloroj komponas la sunan spektron.

Kiam stela lumo falas sur prismon, saman fenomenon ni observas, sed la spektro enhavas

diversajn malbrilajn strekojn. Ĉi-tiuj estas tre gravaj ĉar indikas la elementojn troveblajn en la stelo. Ankaŭ ili permesas koni la abundon de tiuj elementoj.

Aliajn gravajn informojn ni povas dedukti el la spektroj per la Doppler-efiko. Kiam stelo (mal)proksimiĝas, la strekoj estas translokitaj al la (ruĝa) blua flanko de la spektro. Kaj des pli granda estas la translokado, des pli granda estas la rapideco de la (mal)proksimiĝado. Sufiĝas do mezuri la distancon inter la strekoj kaj iliaj normalaj lokoj (kie ili estus sen movado de la stelo).

Per la spektroj aperis nova scienco en astronomio: la ASTROFIZIKO.

La magnetaj polusoj.

La radlo de via komaso indikas proksimume la nordan direkton. Pli precise ĝi indikas la "magnetan nordon", kiu ne koincidas kun la geografia nordo. Tiu dekliniĝo ŝanĝas dum la jaroj: 8° kompare al la geografia nordo okcidente por la magneta nordo en 1700, 22° okcidente en 1800, 15° en 1900 okcidente, en 1950 7° okcidente. Ĝi estos preskaŭ nula en 2000.

Kiam la vulkanlafo malvarmiĝas, ĝi "enkateniĝas" la magnetan kampon ekzistantan je tiam momento en tiu loko. Aliparte oni povas nun kalkuli

la aĝon de la rokoj. Tiel estas eble koni la direkton de la norda poluso, je diversaj momentoj de la geologia vivo de nia planedo. Kaj mirinde : oni trovis ke la magnetismo plurfoje inversiĝis, t.e. la norda poluso jam estis de la suda magneta poluso.

Ĉiun strangan fenomenon klopodas nun klarigi la scienculoj.

La artikoloj "La variantaj steloj", "La stelaj spektroj" kaj "La magnetaj polusoj" estas de André HÉCK, studento, kiun ni tre dankas por lia klabore.

Mia fratino estas superstiĉa.

1) Mia fratino

Mi havas fratinn. Ŝi estas la plej bona el fratinoj, sed ŝi estas superstiĉa.

Meti ĉapelon sur la liton estas monstrega faro. Kaj ŝi neniam portas ĉapelon. La nigra koloro donas la malfeliĉon. Ŝi malfermas neniam pluvsimilon en sia ĉambro. Ŝi timas la nigrajn katojn. Ŝi preferas esti premigita per aŭtomobilo sed ne trapasi sub ŝtuparon sur la trotuaro. Domu neniam ~~MAZURKAN~~ ĉar ili naskis larmojn. Ŝi havas ŝiam kun si sian kvarfolion. La vendredo 13 okazas katastrofo : ŝi ne volas eliri sian liton.

Mia fratino demandas la spiritojn. Unu tagon, ŝi petis ke miaj gepatroj kaj mi sidigu ĉirkaŭ ronda tavolo. En la malklara ĉambro, ŝi demandis la spiritojn. Baldaŭ, voĉo respondis ŝin stulte : estis patro kiu imitis la spiritojn.

2) Ni estos dek-tri ĉe tavolo...

Tiun tagon, mia fratino ricevis leteron. Malnovaj klasamikoj invitis nin por manĝi en restoracio en Liège.

"Venu, kaj ni estos dek-tri ĉe tavolo" diris la letero. Mi alitis la vojaĝbiletojn, sed mia fratino rifuzis foriri : "Dek-tri ĉe tavolo ! Kian strangan ideon vi havas, per pensu ke mi forirus !". Sed patro postulis ke Marcelino forirus !

3) Ŝi timas la katojn

La morgaŭ, ni estis en Liège. Miaj amikoj atendis nin, kaj frenda junulo akompanis nin. Li nomiĝas Karl kaj studas la juracarton. Ŝi ne iris restoracion.

"Dek-tri ĉe tavolo ! Kiel danĝero estas !" Ĉi tiu fratino profetis nin grandegajn katastrofojn. Efektive, la vespero estis stranga !

La supo estis varmega kaj Marcelino bruŝvundis sian langon. La viando estis tro spicata. La kelnero verŝante vinon estis muŝita kaj renverŝis ĝin sur Marcelinan robon.

Malgranda *Kakto* antikva nebulo falis kaj pikis ŝian brakon kiam ŝi prenis la legompladon. La plado falis kaj renverŝis botelojn kaj glasojn. Tamen, iu ŝajnis sin amuzi pro la aventuroj de Marcelino. Estis Karlo; kiam ŝi bruligis sian lignon, li diris "Vi devas trinki malmalte da akvo". Li regardis kolere la nekulpajn kolieron kaj, kiam la la ŝranko vundetis mian fratinojn, li diris ŝin: "Ĉu vi ne have puran nastukon, mi petas?" Mi donis li la mian, sed ŝi tuj protestis: "Mi ne toleras! Ŝi estas nigra!"

"Tamen, intercapiis li, la nigra koloro konvenas bonege viajn blondajn harojn". Kaj la koketeco gajnis....

4) Ĝio finas bone.

Du tagojn post tiu vespero, Marcelino eniris mian ĉambro montrante du paketojn. La unuaj donacoj de Karlo. Kaj ŝi portis beletan nigran ĉapelon.

Mi diris ŝin:

- Oh! Mi kredis ke la nigraĵoj naskis la malfeliĉon!
- Estas nevere!
- Atentu vi metas vian nigran ĉapelon sur la liton!
- Sed kiel vi parolas stulte, subite!

Mi ne kaŝas vin ke ŝi anoncis min sian proksiman ediziĝon kun Karlo....

"Kaj vi devas atenti, diris ŝi ankoraŭ, seriozege, mi kredas ke vi.....superstiĉigas."

Annette PAURES

ESPERANTA-JUNULARGRUPO en SINT-KRUIS

5-a Datreveno de la fondiĝo.

La 1-an de novembro 1963a fondiĝis en Sint-Kruis junulargrupo de trijunaj personoj (maksimume ili havis 14 jarojn), post kurso en la sino de skoltaĵ patroj. Ili komencis korespondi kaj elektis estraron. Ĝiu-jare ili organizis dum la paska libertempo rapidkurson por gefunuloj kiuj poste tuj envenis en la grupon mem, por perfektigi kune en amuzo kaj laboro.

Nun, post kvin jaroj, ekzistas interesa grupo de kvardek gefunuloj, inter 14- kaj 19-a jaroj.

Ili volis feste rememorigi tiuj datrevenon, kaj faris tion la 31-an de oktobro kaj la 1-an de novembro per ekspozicio kaj balo. Ankaŭ la urb-estraro akceptis ilin.

Okaze de tiu akcepto fare de preskaŭ kompleta skabenaro kaj komaruma konsilantaro, la urb-estraro speciale laŭdis la estraron de la junulargrupo, kies prezidanto, Paul Blondelle, jam ek de la komenco gvidis la grupon tra ĝiaj malfacilaĵoj kune kun la kerno de la unuaj tagoj, kiu konsistas el Hilda Lauwers, Paul Blondeelle, Dirk kaj Johan Maertens, Dirk Iserentant.

S-ro Jaumotte, ĝenerala prezidanto de Belga Esperanto-Federacio, nome de la federacion esperantlingve dankis la grupon pro la farita laboro

kaj esprimis la deziron ke la Esperantovivo en Sint-Kruis pere de la junulara grupo ankoraŭ longtempe povu daŭri. S-ro F. Roose, la instruisto de la grupo, kiu gvidis jam kvin kursojn, parolis pri la neceso de internacia lingvo. Finfine Paul Blondelle dankis ĉiujn kaj donacis al la urbestro du librojn por la komunuma biblioteko..

Poste ĉiuj ĉeestantoj subskribis en la oran libron la bele desegnititan paĝon, dediĉita al tiu akcepto. Inter ili estis S-ro Doyelle de la nord-franca federacio kaj estraranoj de ambaŭ grupoj el Brugge, i.a. Ges-oj Poupeye, S-ro Demulenaere, Ges-oj Roose, Ges-oj Maertens kaj R Maertens.

Johan MAERTENS

Karavano al la suno.

Mi estas kontenta pri nia vojaĝo. Nur unu tago ni havis malbonan veteron, estis mi kredas en Carcassonne kiam ni vizitis la plej grandajn fortifikaĵojn de Eŭropo. La unua tago ni vizitis Fontainebleau kaj ni loĝis en Brouges. Ni vidis la katedralon en Brouges. La duan tagon ni loĝis en Cahors. Kiam ni finis manĝi ni promenis sur la ponto Valentré. La kavarano tagon ni atingis Hispanujon. En Barcelone ni vidis 1 aploj grandan bulvardon kiu estas kvin dek metroj larĝa kaj ok kilometroj longa. En Tarragona ni naĝis en la Mediteraneo. Estis ankaŭ en Tarragona ke ni trinkis Zangrian, sorto de vino kiun oni mem preparis. Kiam ni estis sur la vojo al Madrido ni vidis grot-dometojn. En Madrido ni loĝis en la ĉefstrato de

Madrido : Avenida José Antonio. Estis tre varma en Madrido. La butikoj nur estis malfermitaj en la mateno kaj post la kvara. Mi ĉesis esti en la urbo de Madrido. En la mateno oni portis la matenmanĝon al nia ĉambro kiam ni volis. Por la tagmanĝo ni devis mem zorgi. Ni prenis la vespermanĝon sur la teraso de la hotelo. Ni ankaŭ vizitis la muzeon Prado : tio estas tre interesa. Kiam ni estis en Madrido ni ankaŭ faris ekskursojn. La unua al Toledo kaj la dua al "El Escorial".

Estis kun iom da ĉagreno ke ni forlasis Madridon kaj ni veturis al Grenada. Tie la hotelo estis tre bela. Oni povis mem elakti la manĝon, estis la plej bona hotelo kiun ni havis dum la tuta vojaĝo. En Grenada ni restis unu tagon kaj tie ni vizitis la Alambiron. La sekvantan tagon ni estis en Sevilla. S-ro Maertens nin diris ke tio estas la fritkaserolo de Hispanujo. En Seville ni vizitis la Alcazar-n. Ankoraŭ Salamanca kaj tiam ni veturis el Bourges hejmen kie ni ankoraŭ vizitis la Katedralon. En Guetaria, fiŝisthaveno ni povis naĝi en la atlantiko oceano. Por la lasta fojo ni loĝis en Tours kaj tiam ni veturis al Brugge.

Angèle DECOCK

Ni dankas Sron Vanbreuse, kiu kiel kutime multe helpas nin en la plenumado de nia tasko por eldoni ĉi tiun revueton. Ankaŭ ni dankas lia edzino, kiu ĉiam akceptas nin en sia gastema domo. Ni eksciis ke nun ĉi zorgeme laboras por traduki komedion por nia proksima festo.

en Laeken.

Ridiga parolado pri la moderna mondo.

Nur restas, en tiu mondo, ke esperi perdi la kontrolon de ĉiuj niaj sentoj, ke alveni al tuta indiferenteco de nia memrespekto aŭ ke enabismigi en dolĉa frenezeco. Ĉar sen niaj sentojn sen la rimarkinda personeco kiu karakterizas ĉiuj el ni, sen la konscienco kiu senĉese nin turmentas, ni ne estus agacitaj pro tiu ĉirkampreso dum la ĉirkulado, pro tiu atendoj pro niaj ĉiamaj konkursoj kontraŭ la horloĝo kiun ni liveras kontraŭ la tempo kiu ĉiam foriras. Se ni ne plus havus okulojn, orelojn kaj nazon se ni estus atingintaj al la perfektan neadon de ni mem aŭ al tiu dolĉa frenezeco kiu igas nin konsentema pri ĉio, ni ne plus havus lacajn okulojn pro reklampaneloj egelumigitaj, pro la ŝatolanternejoj, ni ne plu havus la orelojn surditigitaj pro la premaj "Klaxonoj" pro la bruo de la motoroj pro tiu maŝinoj de la civilizacio kiu valoras al ni tiom multe da doloroj en la kapo. Kaj plie ni ne plus flarus tiujn mazutajn odorojn de tiuj mirindaj motoroj nomitaj aŭtomobiloj, ni ne plus tremegus antaŭ liberoco kiam ili donas al la plej "noblaj" el laj instinktoj kaj ni ne plu pluzurigus de tiu fraŝa parfumo de putra evo kiu pezas sur niaj urboj. Fine ni ne plu sentus premi-doloron antaŭ senĉesajn minacojn de absoluta milito tiu glavo de lamoklo kiu pendans super ĉiuj niaj kapoj sub la aspekto de brilaj, brilgaj birdoj, ŝargitaj de atombomboj.

J. RENARD
Sekretario CJEV

La dimanĉon la 22-an de decembro 1968, la junaj kantistoj estis invititaj en Laeken por kanti antaŭ ŝia Reĝina Moŝto Fabiola.

Nia grupo envagoniĝis de Verviers al Bruselo je la 12-a kaj duono. La vojaĝo iĝis normale. Kiam ni alvenis en la stacidomo, S-ro Abato Garan, direktoro de la kantaro kiu ni vidis laststampe, atendis nin kun aŭtoĉaro de la lernejo. Li kondukis nin en preĝejon kie filmaparato de la televido filmis nin. Poste la Reĝa aŭtoĉaro alkondukis nin en la kastelon de Laeken.

En la halo du linoj skulptitaj el ŝtono ornamas la grandan ŝtuparon. Antaŭigitaj de servisto, ni iras en luksegajn salonojn. Sur brilantaj pargetoj kuŝas tapiŝoj multvaloraj. Sur bilerdon ni metis niajn surtutvestojn kaj ni vestis nin per niaj tunikoj. Kelkaj el ni estas interesigitaj per harpo kiu versaĵne estas grandvalora. Je la kvarono antaŭ 17a ni eniris grandan salanon kie ni donos la kantan aŭdaĵon kaj nia direktoro ordigis nin kun plej granda simpleco ŝia Reĝina Moŝto eniras la salanon. La plej juna al ni prezentis al ŝi nian novan diskon kaj kelkajn rozburĝonojn. La aŭdado daŭris duonon daŭ horo; poste parolado fariĝis inter ŝia Reĝina Moŝto kaj la junaj kantistoj. Poste kelkaj fotografiaĵoj estis faritaj kun la Reĝino. Poste ŝia Reĝina Moŝto invitis nin sidigi ĉirkaŭ la tablo por manĝi kaj trinki. Post la manĝado estis la momento foriri. Tiamaniere finiĝis tago

ne forgesebla por ĉiuj junaj kantistoj de Stembert.

Marc CHIGNESS 5a Moderna Klaso
de la mezgranda Lernejo de
VERVIERES.

La morto en la malnova Egipto.

Se ekzistas popolo en la Antikaj Tempoj, kiu ligis al morto ĉefan gravecon, estas tiu de la faraono Egipto. Kiam oni instruiĝas ĉi vivo labor- kaj am-modo oni ekrimarkas kun preciza timo ke ĉe tiu popolo ĉio estas farata por la morto. Ĝi estas la tutlasta atingo de el sistemo dediĉita al la honesteco kaj al la respekto al la dioj.

Estas tial ke, en la Egipta koncepto, morti signifas iri al eterna feliĉeco en la paradizajn ĥarbejojn de la transmondo. En la "Kantoj de alu" kiel oni nomis tiam la edemon - la faraonoj reĝis apud la dioj Suno, Felukdeco, saĝeco kaj Vereco dum la ordinaraĵ homoj pranis vere meritatan ripozon ĉe la ombro de la palmoj kaj de la grandegaj sikimoroj laborigante sur sia loko miltegan de malgrandaĵ bonfaraĵ.

Post tiuj klarigoj oni pli bone komprenas tiujn vertojn eltiritajn el Egipta poezio :

"La morto estas hodiaŭ antaŭ mi,
Kiel la esno por la invalido
Kiel eliri el sia domo post malsano,
Kiel la fino de la pluvo,
Kiel la deziro de homo por revidi sian domon"

Tamen estas rimarkinde ke la Egiptoj konceptis la transmondon kiel idilia tero monde kun la tutaj kontenteco kaj la korpaj feliĉoj kiujn la edeno povis havigi al la homoj. Tial, post kiam la "lastaj spiroj" estis konfligitaj el la mortinto, estis necese konservi ĉian lian karnan ŝelon; se ne, la animo de la mortinto, post kiam ĝi estis praviginta ĝian surteran kondukton antaŭ la Tribunalo de la dioj, ne povis rehajniĝi la disovigita korpon. Jen tio klarigas la kutimo de la enal-ŝarigo destinita por gardi sen difekto por eterne la tial fragilan korpon de la homoj. Jen tio klarigas la konstruon de la gigantaj piramidoj kaj la strangajn tombajn pejzaĝojn kiu celas al faciligo de la reveno de la animo en la korpon. Estas la fundamenta aspekto de la "Egipta fascino" tiu senĉesa maltrankvilo, ne pri la venonta vivo sed pri la preparota morto. Neniam lando havis pli da tomboj, pli da funebraj maŝinoj de grandeco ĝis nun ne ankoraŭ atingita.

Nenio montras pli bone la senco de la morto en la malnova Egipto ol tiuj kelkaj versoj atre-
kitaj de karpisto en tombo de la nova Imperio
(1580-1085 antaŭ Kristo)

"Ne okazas ke vivo plidairigas sur la egipta tero
 Ne ekzistas iu kiu ne iras en la transendon,
 La daŭro de tio kion oni faras sur la tero,
 tio estas la momento de sonĝo,
 Sed la vivo en la alia mondo, ĝi estas eterna."

Johano BRIXHE

lernanto en la 1a latina-greka klase
 (esperantigis Sro Jacob, profesoro)

La poeziaj citaĵoj estas altiritaj el
 "La poésie égyptienne" de P. Gilbert

POST UNO JARO

Kiam la respondeculo de nia revuo petis de mi artikolon, mi tuj pensis "ĉevaloj". Sed mi pripensis ke preferinde ni zorgu pri "alia afero". :

Jen do : La 12a de Januaro 68 ni organizis ekspozicion kiun Lia Ambasadora Moŝto insĝuris. Sed nun mi demandas min kion ni faris post la ekspozicio de Januaro ? Ni certe laboris, sed ne ankoraŭ sufiĉe por la propagando de la internacia lingvo ! Ni organizis feston en Junio kaj du kursojn en la Ateneo de Verviers kiuj havis grandan sukceson. Ĉu ni nur faris tion ? NE ! Nia sekretario vojaĝis al Britujo dufoje, kaj ni havis la plezuron akcepti la filinon de la gastiganto de J. Renard. Multaj ĵurnaloj parolis kun Ilona. La filino de Sro Buttlinger el Londono

kaj ni rimarkis ke la lernantoj de Verviers devas ankoraŭ multe lerni por bone paroli la lingvon de Zamenhof. Tio postulas kontaktojn kun junaj esperantistoj de nia lando kaj de fremdaj landoj.

Mi petas al la ĝejurnaloj, kiuj legas tiun revuon : kontaktu junajn laboristojn kaj lernantojn kaj montru al ili ke Esperanto estas pli bona ilo por atingi la pacon en la mondo.

Pripensu tiun problemon kaj lernu Esperanton

Robert NOEL
 Prezidanto de C.J.E.V.

Bona ideo

Petro : Petro mi deziras havi grandan tamburon aĉetu ĝin !
 Patro : Ne, Petro, ĉar tiam mi devus aŭdi tiun bruon la tutan tagon !
 Petro : Sed, Patro mi tamburas nur kiam vi dormas.

Rimarkoj :

- a) la difinoj sekvataj de (R) signifas ke la demandata vorto estas radikvorto, de sen finaĵo O, I aŭ A.
- b) je ekzakta solvo de la krucvorttenigmo vi kapablos legi en la laŭrandaĵ kvadratoj, komencata de la unua supra maldekstra kvadrato kaj en la direkto de la horloĝmontriloj sloganon tre favora al Esperanto. Jen do la difinoj :

HORIZONTALAĴE :

- 2. neprofesiulo, diletanto (R)
- 3. ebenigi aŭ glatigi lignon aŭ metalon, tranĉante malekzemplajn per speciala ilo
- 4. poseda pronomo, signifanta "posedata de mi" - instrumento, aparato - pronomo de la unua persono.
- 5. farita laŭ taŭga regula aranĝo de aferoj - meti en posedo de iu, ĉu provizore, ĉu definitivé (R)
- 6. idem kiel 4 horizontale, traa difino - membro (R) (laŭ inverse skribita) - flanko parto de la vizaĝo (R)

- 7. ejo destinita por financaj aŭ komercaj spekulacioj (R) - filo de frato aŭ fratino (R)
- 8. multscienco pri detaloj kaj dokumentoj en iu faka scienco (R) - konjunkcio montrante la logikan sekvon, la konkludon
- 9. viro kiu devenas de la antikvaj Hebreoj, aŭ havas la saman religion kiel ili (R) - nedifina pronomo, montrante iun objekton, aferon, ideon (inverse skribita).

VERTIKALE :

- 2. marŝi - alkohola trinkaĵo ekstraktata el suko de la sukercano (R)
- 2. solena arma revuo (R) - senluksa barako aŭ butiketo el lignaj tabuloj
- 4. inklina, tendenca - pozitiva elektrodo de pilo (R)
- 5. perforte forpreni tion, kio apartenas al alia, kapti, ŝteli - muzikaj ritmaj melodioj
- 6. ringforma insulo formita de koraloj koni certe kaj precize (imperativa modo)

7. mallonga, memoriga skriba resumo
8. nombro -
enloĝanto de nordeŭropa landeto (R) -
sufikso esprimanta malbonecon aŭ malbonan
kvaliton
9. speco de malgranda korniko (R)

Proksima Numero :

je la 20a de Aprilo - Sendu vi tiuj
la artikolojn !!

C.J.E.V.

Prezidanto : R. NOEL rue du Palais 120

Sekretario : S. DENIS Rue des GrandsChamps, HEUSY

La belegajn kovrilojn, kiuj ornamis la lastan revuon
kaj ankaŭ ĉi tiun, ni ŝuldas al nia profesoro
re Maurice DEMIL. NI tukore dankas lin.

La malfrua apero estas kaŭzita, pro la
malbona vetero: ni ne ricevis taŭgan paperon
sufiĉe frue -